nia voĉo

madrida esperanto-liceo februaro 2014

## ĜENERALA KUNVENO DE MEL

La lundon 27an de januaro okazis la ĝenerala kunsido de Madrida Esperanto-Liceo, en la nova oficiala sidejo en strato Rodríguez San Pedro, 13, de Madrido. Iom antaŭe la anoj de Liceo ricevis la oficialan alvokon kaj necesajn dokumentojn. Jen resumo:

1.- La ĉeestantoj aprobis la protokolon de la kunveno okazinta antaŭ unu jaro

2.- La sekretario informis pri membraro, inkluzive de aliĝoj kaj malaliĝoj. La bilanco ĉijare estis pozitiva kvante (pli da aliĝoj; malaliĝoj ĉefe pro manko de pago de kotizo).

3.- Oni aprobis la kontojn de la jaro 2013

4.- Oni diskutis kaj aprobis la Buĝeton por 2014. Ĝi estis fiksita je 1300 eŭroj.

5.- Oni legis kaj aprobis raporton de aktivaĵoj de 2013

6.- La ĉeestantoj aprobis Programon de aktivaĵoj por 2014. Oni planas daŭrigi la informan agadon, kaj specife la rilaton al amaskomunikiloj.

7.- Estis elektita nova estraro

8.- En la fako "Demandoj kaj proponoj", oni studis la eblecon transigi la bankan konton al alia etika banko (Triodos aŭ Fiare, kiam tiu ĉi funkcios). La estraron oni komisiis plu studi la aferon. Oni ankaŭ decidis esplori novajn vojojn por la disvastigo de la lingvo (anoncoj, ktp)

Dum venontaj tagoj la anoj de la asocio ricevos la protokolon kaj dokumentojn aprobitajn. Se alia leganto deziras ricevi kopion, bv. skribi al la oficiala adreso de la grupo.

## NOVA ESTRARO DE MEL

Laŭ preskribas la Statuto, kaj post fino de deĵorperiodo, la Ĝenerala Kunveno de Madrida Esperanto-Liceo elektis novan estraron por sekvaj kvar jaroj. Ĝin konsistigas:

Prezidanto: Manuel Parra

Sekretario: Ricardo Biurrun

Kasisto: José Francisco Platas

Voĉdonanto pri informado kaj redaktado de *Nia Voĉo*: José Antonio del Barrio.

Voĉdonanto pri instruado: Juan Antonio del Castillo



Nia nova prezidanto, Manuel Parra, naskiĝis en Segovio en 1963. Li diplomiĝis kiel bazlerneja instruisto sed neniam praktikis tiun profesion, kaj ĉiam laboris kiel ŝtata oficisto en diversaj fakoj; ekde 1995 en la ŝtata instanco pri Trafiko, en Madrido.

Esperanton li eklernis en 1986, instruata de César de Mosteyrín kadre de monto-grimpada klubo en Segovio. Partoprenis kelkajn por-junulajn renkontiĝojn en Italio, Svedio, Germanio...

En 1995, logata de iu madrida esperantistino, Manolo ekloĝis en Madrido kaj komencis kunlabori kun Marcos Cruz en la centra oficejo de Hispana Esperanto-Federacio. En HEF postenis kiel sekretario ekde tiu jaro ĝis 2005, sub la sinsekvaj prezidoj de Antonio Alonso kaj Miguel Ángel Sancho. Samtempe partoprenis la madridan lokan movadon kunlaborante al diversaj aranĝoj. En 2010 li iĝis sekretario de Madrida Esperanto-Liceo kaj de januaro 2014 ekprezidas ĝin.

## APOGU VIAN ESPERANTAN GRUPON

Memoru ke la jara kotizo de MEL plu restas je 12 €, pagebla en la konton ĉe la banko Sabadell. Notu ke nun necesas la IBAN, kaj do la tuta numero estas: **ES75 0081 7110 9800 0126 6730**. Ne forgesu indiki vian nomon ĉe "concepto", ĉar male ni ricevus sennoman enspezon

## DENOVE EN RADIO VALLEKAS

Pluan fojon madridaj esperantistoj partoprenis programon en Radio Vallekas. Tio okazis la 26an de januaro per unuhora elsendo en alia programo kies nomo estas *"Erre ke erre"*. Kvin homoj estis intervjuataj surloke, kaj unu telefone el Ekstremaduro, pri la lingvo, pri nia historio, pri niaj renkontoj kaj vojaĝoj, pri nia literaturo, pri la realo de Esperanto, ktp.




## KURSO KAJ EKSPOZICIO EN VALDEMORO

Alejandro Pareja gvidos kurson de Esperanto en la Municipa Biblioteko *Ana María Matute* de Valdemoro (en la avenuo de Hispanoamérica). La lecionoj okazos merkrede vespere, je la 19,30, de la 5a de marto ĝis la 4a de junio. Informoj kaj aliĝoj ĉe Alejandro, en la adreso de Liceo aŭ rekte en la Biblioteko (telefonnumero: 918099629). Bv. diskonigi.

Oni ĝin akompanos per ekspozicio, kiu estos inaŭgurita fine de februaro kaj restos dum la tuta monato marto.

## RABATOJ ĈE HISPANA KONGRESO

Jen bona novaĵo pri la venonta 73a Hispana kaj 18a Andaluza Esperanto-Kongreso en Arundo (*Ronda*, Malago, inter la 1a kaj 4a de majo): jam pli ol 70 homoj aliĝis ĝis nun. Sed jen alia bona informo por malfruiĝintoj: la organizantoj decidis doni duan ŝancon kaj lasi du pliajn semajnojn por la unua aliĝperiodo. Oni povas do profiti je rabatita prezo ĝis la 15a de februaro.

Oni ankaŭ anoncis eĉ pli bonan novaĵon por infanoj kaj junuloj: homoj naskiĝintaj en 1990 aŭ poste ĝuos senpagan aliĝon. Informoj ĉe http://arundakongreso2014.wordpress.com/ aŭ skribante al kongreso@esperanto.es

## GRUPO EN FEJSBUKO

Estis kreita grupo en la socia retejo Fejsbuko (*Facebook*), por esperantistoj loĝantaj en Madrido kaj ĉirkaŭaĵoj. Jam 70 homoj membras en ĝi. Se vi partoprenas tiun reton, jen ĝia adreso: https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

## VENONTAJ RENKONTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL, plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

Oni plu esploras diversajn lokojn kie sinsekve celebri la ĉiumonatajn babilrondojn. En la unua de februaro oni elektis trinkejon *"Nuevo Apolo"* en la strato Doctor Cortezo, 15.

Aliflanke, la lernantoj de la grupo de Juan en la Centro *La Tabacalera*, komencos foje rendevui post la klaso, por senĝene praktiki la lingvon. Oni invitas ankaŭ aliajn komencantojn kaj pli spertajn esperantistojn.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj kaj detaloj pri renkontoj kaj aliaj vizitu regule la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ kaj la retejon de MEL ĉe la adreso http://www.esperanto.es/mel.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com